nia voĉo

madrida esperanto-liceo septembro 2020

## ONI ZORGE REPRENAS ESPERANTO-AKTIVADON

Post la someraj ferioj, la agado por Esperanto en Madrido plu okazas kun atenta zorgado.

La sidejo malfermiĝos ĉiujn lundojn kiel kutime, do ekde la 7a de septembro, sed ni plu rekomendas ke vi kontaktu antaŭ ol veni, kaj sekvu la prisanajn rekomendojn.

Madrida Esperanto-Liceo planas organizi la unuan ĉeestan aktivadon la 12-an de septembro, sabate. Ni rendevuos en la parko Retiro, apud la statuo de Ricardo Codorniu, ekde la 6a horo vespere. Ni limigos la kolektiĝon al 10 homoj, kaj se alvenas pli da interesatoj, oni kreos apartajn kunven-grupojn. Bv porti maskon kaj kontraŭinfektan materialon, ne alportu manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj sekvu la rekomendojn de la sansistemo.

Dum la daŭro de la monato ni sekvos la evoluon de la pandemio, kaj, post la sperto de tiu renkontiĝo, oni studos eblajn agadojn kaj renkontojn. Bv. atenti pluajn informojn.

## RETAJ RENKONTIĜOJ

Dum la pasintaj monatoj kreskis la reta agado en Esperantujo. Kiel ni jam informis, la plej kompleta agado, organizata de Universala Esperanto-Asocio, estas MondaFest'2020. En ties kadro disvolviĝis la Virtuala Kongreso (VK), anstataŭinta la kutiman Universalan Kongreson, kaj aliaj renkontoj, kiel la Internacia Junulara Kongreso, la Konferenco de ILEI, la Tago de Eŭropo kaj aliaj interesaj eventoj. Speciale la VK brile sukcesis, kun bona organizado, riĉa enhavo kaj sufiĉe kontentiga partoprenado. Se vi ne povis ĉeesti, pluraj pecoj estas spekteblaj en la kanalo de UEA: https://www.youtube.com/user/UEAviva.

En la kadro de MondaFest, la 6an de septembro, je la 16a horo mezeŭropa tempo, okazos la ceremonio de disdono de premioj de la Belartaj Konkursoj de Esperanto de UEA, kun reĝisorado de la hispanaj verkistoj Miguel Fernández kaj Miguel Gutiérrez Adúriz. Legu detalojn ĉe: https://eventaservo.org/e/1d90c8.




Aliajn venontajn eventojn vi povas trovi en la retejo http://mondafest.net aŭ pli ĝenerale en http://EventaServo.org.

## POR PLIAJ INFORMOJ

Por informiĝi pri daŭraj agadoj virtualaj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com